# Esperanto en Danio

23-a jarkolekto • n-ro 2 • majo 2016



**Esperanto en Danio**
membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

**Adreso de la prezidanto:**
Peter Wraae
Eremitageparken 17 st, C
2800 Lyngby
☎ 60 70 79 69 peter@wraae.dk
Ĝirokonto de DEA: 1551-805 7370
UEA-kodo: deaa-t

**Kromaj estraranoj:**
Arne Casper Mortensen (kasisto)
Finn Østerbæk (vicprezidanto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Bent Jensenius
Ileana Schrøder

**Redakcia adreso:**
Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

**Presado:**
DDFO

**Adresŝanĝoj al:**
Finn Østerbæk ☎ 24 96 04 45
finnoesterbaek@gmail.com

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

**15.08.2016**

## Enhavo

**Nova prezidanto de DEA..........3**
**Vortoj okaze de la transdono….4**
**Jarraporto de DEA por la jaro 2015..........................................5**
**Protokolo de la jarkunveno de DEA.........................................16**
**Programo de KEK....................17**
**FLAM-analizo de la Dana Esperanto-Movado..................18**

# Nova prezidanto de DEA



Dum nia ĵus pasinta jarkunveno kiu okazis en Odense, mi estis elektita kiel nova prezidanto de DEA.

De Ileana Schrøder estas donita al ni estraranoj organizo kiu tre bone funkcias, en kiu estas tradicio ke ni bone kunlaboras.

Ileana estis elektita kiel prezidanto 2003, kaj vigle okazigis multaj agojn. Ŝi:

- starigis novaspektan bultenon de Esperanto en Danio
- starigis sekcion de ILEI en Danio
- reestablis kunlaboron kun UEA
- iniciatis novan hejmpaĝon
- iniciatis plurajn Esperanto-ekspoziciojn por neesperantista publiko
- iniciatis faradon de du novaj vortaroj Esperanta–Dana kaj Dana–Esperanta
- flegis kontakton al institucioj kiuj povus havi intereson por nia movado
- kune kun UEA ŝi organizis UK en Kopenhago en 2011


Ŝi faris grandan kaj signifan laboron por la Esperanto-movado en Danio - dankon por ĉio. Ŝi feliĉe restas en la estraro dum periodo por transdoni siajn spertojn al la movado, kaj ŝi povas finfari kelkajn taskojn.

Oni povas demandi ĉu restas laboro post ŝia periodo kiel prezidanto. La estraranoj kaj mi opinias ke jes. Esperanto ne estas ĝis nun akceptita kiel komuna lingvo de la mondo, kaj ni tial daŭre klopodos persvadi por nia lingvo. Ni daŭre partoprenados en ekspozicioj, verkos artikolojn en gazetoj, faros prelegojn kaj ofertos enkondukojn al radiostacioj. Ni ankaŭ komencis esplori la eblecon fari jarkunvenojn kune kun la sveda movado.

Mi opinias ke mi havas privilegion havi intereson pri Esperanto. Se oni rigardas nian nuntempan mondon, ekzistas multaj konfliktoj, ekzemple inter politikaj partioj, religioj, kontinentoj kaj laŭ mi nia lingvo estas kiel donaco se oni preferas pensi en pacema kaj optimisma maniero. Nia lingvo donas al ni eblecon pensi mondskale.

*Peter Wraae*

# Vortoj okaze de la transdono



Post 13 jaroj da prezidanteco alvenis por mi la tempo rezigni tiun gravan postenon kaj elkore bonvenigi la novan estron de nia landa agado Peter Wraae. La trarigardo de la ĉefaj atingoj de tiu periodo menciitaj de Peter Wraae memorigis min pri kelkaj aliaj gravaj atingoj: la akiro de Trofeo Fyne de UEA akirita en 2005, kiu estas aljuĝata ĉiun duan jaron al la landa asocio kiu plej agadis en multaj kampoj ,la 100a jubileo de DEA en 2008, kaj la refondo de la junulara sekcio, kiu bedaŭrinde denove post la dua refondo tamen ŝrumpis kaj organize ne funkcias kontentige. Alia afero kiu lastatempe ĉargrenis min estas la malkresko de la membraro pro la kadukiĝo de niaj membroj kaj la fakto ke novaj manieroj lerni la lingvon ne alportas automate novajn membrojn, almenaŭ ne en la dezirata nombro.

Ankaŭ la estraro de nia centra organizo UEA analizas tiun fakton kaj verŝajne proponos novajn kategoriojn de menbreco, pri kiujn oni diskutos dum la Universala Kongreso en Nitra. Sed kiel ĉiam la Movado daŭrigas sian strebon laŭ la konata onidiro de nia movado: guto post guto…..kaj mi ne rezignas labori por nia celo, sed daŭrigi en aliaj bezonataj kampoj.

Fine mi volas danki la estraranojn por ege bona kunlaboro dum la pasintaj jaroj, kaj ĉiujn niajn fidelajn membrojn, sen kies apogo nia dana movado ne povus agi kaj ekzisti.

*Ileana Schrøder*

# Jarraporto de DEA por la jaro 2015

Dum la jaro DEA partoprenis en pluraj aranĝoj. En februaro kiel kutime ni partoprenis en la foiro Krop-Sind-And en Falkoner-Centro, kie ni alparolis interesitojn. En marto ni partoprenis ankaŭ la saman foiron en Odense. En junio la Komunumo de Frederiksberg invitis nin partopreni en ilia Tago de Diverseco, kaj ni ĉeestis kun budo. Nia estrarano Bent Jensenius sukcesis denove akiri budon en la "Vojaĝfoiro" (Rejsemessen for Kvalitetsrejser) en oktobro. Okaze de la UN-tago, kelkaj el niaj membroj partoprenis la festadon de la 70-jara jubileo de Unuiĝintaj Nacioj la 24-an de oktobro en la halo de la urbodomo de Kopenhago.

La jaro 2015 estis kongresa jubilea jaro pro la 100-a Universala Kongreso en Lillo. Por ke pluraj membroj, precipe tiuj kiuj ankoraŭ ne spertis la internacian etoson dum Universalaj Kongresoj, DEA kaptis la okazon aranĝi bus-karavanon al la 100-jara jubilea kongreso en Lillo. La karavano estis ege sukcesa, aliĝis 35 personoj, plejparte danoj, sed ankaŭ pluraj el niaj najbaraj landoj, precipe el Svedio. Dum la revenvojaĝo, eĉ pliaj prenis la okazon vojaĝi kun ni al Danlando. Mi elkore dankas nian spertan ŝoforon Peter Wraae, sen kiu la vojaĝo ne estus realigebla.

Kunlabore kun KEK, DEA aranĝis sukcesan Zamenhofan feston la 13-an de Decembro, kie ni havis la okazon denove inviti ankaŭ membrojn de DEJO kun familianoj kaj infano kiuj ege agrable distris nin kantante ĉarmajn infanajn kaj kristnaskajn kantojn.

Post rifuzo dum tri jaroj, ni finfine akiris pozitivan respondon al nia Erasmus+ projekto pri instruista trejnado. Ni sendis niajn Esperanto-instruistojn al aliaj eŭropaj organizoj por akiri pli da pedagogia trejnado. Kvar el niaj instruistoj ĉeestis trejnadon en Herzberg kaj aliaj kvar en Oostende dum la ILEI-konferenco, kie oni organizis specialan programon pri instruista trejnado. Precipe tiu trejnado kadre de ILEI estis altnivela. La lasta instruisto ĉeestos fine de aprilo la trejnadon en Herzberg. Ni denove

sendis Erasmus+ projekton al la dana agentejo, kaj ekscios ĉi-somere, ĉu la projekto akiros pozitivan respondon.

La junulara sekcio DEJO revigliĝis, sed bedaŭrinde la ĝisnuna prezidanto fine de la jaro rezignis pro sia laboro kaj forvojaĝo. Li tamen sukcesis skribi ampleksan raporton, kie oni povas legi pli detale pri la streboj kaj agadoj de DEJO:

Bedaŭrinde ankaŭ en 2015 ni konstatis ke la nombro de niaj membroj malkreskas, precipe en Kopenhago, dum la nombro en la aliaj kluboj estas stabila. En 2015 por la unua fojo ne eblis aranĝi kurson por komencantoj en Kopenhago. Agadplano pri varbado de novaj interesitoj estas nepre necesa prioritato de la estraro. Precipe ankaŭ varbado de junuloj kune kun DEJO devas esti grava agadkampo, ĉar ni daŭre konstatas ke ni ĉiujare perdas tre stabilajn sed maljunajn membrojn pro aĝo kaj forpaso. Do, ni nepre devas intensivigi la varbadon. Sed feliĉe ni spertis ankaŭ pozitivajn signojn: lastatempe nin kontaktis pluraj personoj kiuj volas membriĝi, verŝajne personoj kiuj lernis Esperanton pere de Duolingo

En 2015 ni perdis elstarajn kaj fidelajn membrojn de de nia movado: Lars Kromann el Næstved kaj Eugeniusz Ribarczyk el KEK.

Fine mi elkore dankas miajn estraranajn kolegojn por ege bona kunlaboro dum la pasinta jaro, kaj ĉiujn niajn fidelajn membrojn sen kies apogo ni ne povus agi kaj ekzisti.

**Eksteraj rilatoj**

Ni daŭre estas membro de la reprezenta komitato de la UN-Asocio, membras en K.U.K.S, la ombrela asocio de danaj kaj alilandaj kulturaj asocioj, de la neregistara organizo de Baltaj Landoj kaj de la Ministerio de Paco (Fredsministeriet), ombrela organizo de asocioj de la pacmovado. Tiamaniere ni plenumas la taskon esti videblaj ekster niaj esperantaj rondoj.

**Informado**

*Esperanto en Danio*

La estraro diskutis pri la eventuala reta elsendo de nia revuo Esperanto en Danio, sed decidis daŭrigi la paperan version, kiu aperas 4-foje jare.

*Fejsbuko kaj Hejmpaĝo*

La fejsbukan paĝon ”Amikoj de Dana Esperanto Asocio” daŭre kaj sperte prizorgas nia ege aktiva membro Betty Chatterjee. La paĝo havas pli ol 300 membrojn. Ŝi ankaŭ prizorgas nian nove renovigitan hejmpaĝon.

**Gazetartikoloj**

*Raportas Jens S.Larsen*

Serĉo per la retejo infomedia.dk informas ke la vorto Esperanto aperis 74-foje en la dana gazetaro dum 2015. La plej ĝojiga estas ke 11 el ili temas pri vivantaj Esperanto-uzantoj, plejparte kaŭzitaj de jutlandaj partoprenontoj de la 100-a UK en Lillo, dum estas nur 2 nekrologoj (Inger Højrup en Kokkedal kaj Grethe Magelund en Svendborg). Al tio oni adiciu 6 artikolojn okaze de la 80-jariĝo de Sven Ziegler, siatempe prezidanto de Østre Landsret (alta kortumo).

Nia plej impona gazetara atingo de multaj jaroj tamen ne estis kaŭzita de ni mem. Temas pri du tutpaĝaj artikolegoj en la semajna gazeto Weekend-Avisen pri la frua Esperanto-historio en Danio, verkitaj de Arne Hardis kaj aperigitaj ĝustatempe antaŭ la UK. Tiaj artikoloj tamen ne multe faras por atentigi ke Esperanto daŭre vivas, same kiel 4 artikoloj en la provinca gazetaro pri la personaj memoroj de diversaj Esperantistoj. Simile la 13 ekzemploj de uzo de “Esperanto” kiel nura metaforo pri io komuna aŭ stranga – ekzemple pri la lingvaĵo inter la metroaj laboristoj en Kopenhago – helpas teni la memoron pri Esperanto viva, sed ne ligas ĝin al io sukcesa.

Por ligi imagon de sukceso kun Esperanto precipe taŭgas informoj pri literatura aŭ alia arta uzo de Esperanto: dum 2015 entute 9 artikoloj, precipe

pri tradukoj de la sveda Astrid Lindgren. Du el la artikoloj eĉ asertas ke verkoj de la konata aŭtorino Helle Helle ekzistas en Esperanto-traduko, kaj ankaŭ la Vikipedia artikolo pri ŝi donas tiun informon. Ĝi bedaŭrinde estas absolute malvera, sed eble oni vidu tion kiel instigon.

La lasta grupo estas entreprenoj k.s. kun Esperantonomo. Tie la restoracio en Stokholmo dum 2015 superregis kun 16 mencioj el 26. Rimarkinda estas mencio de “Asocio”, la nomo de helpa programo de la danaj skoltaj organizaĵoj por skoltismo en orienta Eŭropo.

**Libroservo**
*Raportas Arne Casper*
Dum la Tago de la Libro la Libroservo sukcesas vendi plurajn librojn de nia stoko. Ĉi-foje pro la translokiĝo de nia oficejo en Tomsgårdsvej al pli malgranda ejo, ni decidis donaci malnovajn librojn de la stoko de la iama biblioteko de la Klubo de Vejle al niaj membroj. Tial la Libroservo preskaŭ ne vendis novajn librojn dum la jaro, sed esperas fari tion dum la venonta Tago de la Libro.



**Ĉefdelegita laboro**

*Raportas Arne Casper*

La nombro de individuaj memnro de UEA estis stabila en 2015, verŝajne pro la sufiĉe alta nombro de niaj membroj kiuj partoprenis la UK en Lillo. Bedaŭrinde pluraj personoj nur membriĝas al UEA kiam ili partoprenas la kongreson, eĉ se UEA daŭre bezonas stabilan membronombron.

**DEJO**

*Raportas Filippo Botta*

En la komenco de la jaro, DEJO troviĝis en ne tro bona stato. Ĝi havis ne pli ol sep anojn entute, kaj ne estis estraro. Ĝi estis sekcio en dormanta stato, nome ne laŭleĝe eksigita sed laŭfakte ne aktiva. En tia stato ĝi ekde longe estis.

Mi do alvokis la jarkunvenon de DEJO, kiu laŭ ĝia statuto – teorie ankoraŭ valida – devas okazi ĉiujare. Mia celo estis per tia ago restarigi la sekcion. La esto de fortaj kaj viglaj junularaj Esperanto-asocioj en aliaj eĉ najbaraj landoj esperigis min ke eblus ankaŭ al Danio donaci junularan kaj organizitan Esperanta vivon. Do, ĉiuj interesitaj Esperanto-parolantaj junuloj kunvenintaj en la jarkunveno (ni estis kvin) tie decidis formi novan estraron, en kiu mi estis elektita prezidanto. Nia celo por la jaro antaŭ ni jenis: unue, redoni al DEJO formalan strukturon kaj praktikajn ilojn, per kiuj la fortoj de la DEJO-anoj povos kunordiĝi por Esperanto-rilataj aktivadoj; due, rekomenci disvastigi inter la danaj junuloj la konon de la lingvo aŭ almenaŭ scion pri ĝia ekzisto; kaj trie, per niaj estontaj kursoj por komencantoj fare de ni organizitaj, pliigi la kvanton de anoj de la sekcio, por ke la sekcio povu vivi sendepende de ni en la venontaj jaroj, per la vivo de nova generacio de junuloj.

En la unua celo almenaŭ parte ni sukcesis. DEJO havas nun utilan ilaron por organizi la sekcion, kunordigi la strebojn de la aktivulojn, kaj ĉefe disvastigi pri niaj aktivadon. La dokumentaro estis organizita en reto per Guglo-dokumentoj, kaj estis kreita Guglo-grupo danke al kiu la estraro

povas komuniki efike kaj rapide kaj are diskuti. La oficiala DEJO-retejo (dejo.dk) estis renovigita; tio laŭ nia plano devus iĝi speco de virtuala centra starpunkto de la asocio, per kiu la scivolemuloj povos trovi nin, la interesitoj povos informiĝi pri la nuntempaj nia aktivadoj, kaj la eblaj anoj povos kontakti nin. Bedaŭrinde ĝin ni ne sukcesis kompletigi kaj daŭre ĝi atendas esti finita. La plej efika ilo kiun ni kreis estis la Fejsbuk-paĝo de DEJO, kiu nun havas pli ol cent ŝatantojn, do cent homoj kiuj povas tuj kaj ĉiam esti informitaj pri ĉiuj faraĵoj kaj ĉiu novaĵo de la asocio.

Danke al la Fejsbuk-paĝo ni sukcesis organizi kurson por komencantoj, kiu daŭre okazas; nun, ĉar la komencantoj iĝis meznivelaj kaj alvenis dumtempe aliaj novuloj, la kurso duobliĝis, unu por komencantoj kaj alia por la meznivelaj kiu daŭriĝis la studadon el la antaŭa kurso.

Dumtempe, ni komencis partneradon kun TEJO, kiu kuntrenis DEJO-n kaj aliajn eŭropajn junularajn asociojn en Erasmus+ projekto, nomita ETEY, kiu temas pri la trejnado de trejnistoj. Tiu projekto konsistas en kunvenoj, okazantoj dum du jaroj (2015-2016) kadre de la ĉefaj junularaj eŭropaj renkontiĝoj, fare de po du membroj de la partoprenantaj landaj asocioj. Dum tiuj kunvenoj la partoprenantoj ricevas, precize, trejnadon kiel instrui. Tiu estis bona okazo por engaĝiĝi kun aliaj junularaj asocioj, sed ankaŭ por vojaĝigi novulojn, do mi bedaŭras ke ĉefe la partoprenantoj estis iuj de ni estraranoj, ĉar mi ne sukcesis trovi ekster DEJO junulojn interesatajn pri partopreno.

Dum la tuta jaro, pro mia rolo, mi devis kolizii kun disvastiĝinta pensmaniero laŭ kiu sekcio junulara ne necesas en Danio, ĉar la lingvo jam povas vivi sen burokratio kaj sen organizado; opinio kiu mi persone kontraŭas, eĉ se mi mem ankaŭ ne aparte ŝatas burokrataĵojn. Mi esperas ke nia partoprenado en tiu projekto montru male, ke la esto de organizo ebligas okazojn, kiel ĝuste la partoprenado en internaciaj projektoj, kiujn la dana Esperanto-junularo ne povus trafi sen jura identeco.

Kie, domaĝe, mi fiaskis, estis en la tria celo, nome la allogo al la asocion

de novaj membroj. DEJO ankoraŭ havas preskaŭ la saman nombron da anoj, do mi iom timas pri la ĝia estonteco ĉar ĝia malgrandeco malfortikigas ĝin. Malgraŭ tio, ĉar la aliaj estraranoj en la jaro 2016 daŭre estas parto de la estraro (malkiel mi, kiu ne plu estas estrarano), do mi havas bonajn esperojn ke ili sukcesos trafi tiun celon, ĉar laborinte unu jaron kun ili mi povis sperti kiom lertaj, konsciaj kaj kapablaj ili estas.

## Jarraportoj de la kluboj

### KEK – Kopenhago

*Raportas Peter Wraae*

Unu jaro forpasis ekde la lasta jarkunveno de KEK, do, oni povas konstati ke tempo pasas rapide.

La 1-an de majo Finn Østerbæk kaj mi helpis al Bent Jensenius, kiu organizis budon en Fælledparken, tie ni alparolis multe da partoprenantoj kiuj festis pro la internacia laborista tago kaj pluraj interesaj diskutoj okazis.

Somere ni bonvenigis Pradip (Esploristo) kaj Krishna Poudel el Nepalo. Mi ĉiĉeronis Pradip en Kopenhago kaj ĉirkaŭaĵoj, kaj ni vizitis la kastelon Kronborg kaj Tivoli. Krishna ankaŭ ĝuis la restadon en Danio, kaj tre kontentis pri la partopreno en la karavano al Lillo. Nia lingvo tre impresis lin, kaj li garantiis al mi ke li certe lernos nia lingvon post sia reveno al Nepalo.

En proksima kunlaborado de DEA, ni okazigis karavanon al UK en Lillo, Francio. Ni preskaŭ povis plenigi la aŭtobuson, kaj pro tio ni povis oferti akcepteblan prezon, kaj estis mia impreso ke la partoprenantoj ĝuis resti kun esperantistoj el Jutlando.

Bent Jensenius kaj Finn Østerbæk faris grandan laboron fari ekspozicion en Verdenskulturcentret inter la 1-a de oktobro kaj 15-a de decembro, dankon al vi ambaŭ. En la sama loko ni celebris la Kulturan Nokton la 9-

an de oktobro, kaj Betty Chatterje tre bone organizis skajpan babiladojn al multaj esperantistoj el pluraj kontinentoj kaj landoj.

La 25-an de novembro mi vizitis la klubon en Malmö. Tie venis brazila sciencisto James Piton, kiu vigle parolis, kaj montris fotojn al ni aŭskultantoj pri sia kolektado de bildkartoj, kiuj montris parton de la historio de Esperanto, Ido kaj Volapuko. Interesa kaj agrabla vespero.

La 13-an de decembro ni en Kulturhuset celebris la tradician Zamenhof-feston. Ni ĝuis la agrablan etoson faritan de muzikantoj kiuj bone distris nin. Betty Chatterje prezentis sian kristnaskan fabelon pri kolboldetoj. Kelkaj gastoj venis el Svedio, Ana Røssum kaj Zita Blaust faris bongustajn kukojn, kaj ni ĉiuj ĝuis la feston.

Dum la jaro ni okazigis multajn interesajn renkontiĝojn. Jen ekzemploj, kaj mi dankas al ĉiuj prelegantoj por iliaj deziroj krei kvalitajn vesperojn en nia klubo.

Betty Chatterjee gvidis legadon de la libro "Mia Fuena Infanaĝo" de Carl Nielsen. – Ana Røssum faris kelkajn interesajn kvizojn, kaj ankaŭ kune kun Mette Hjerting parolis pri ilia vojaĝo al Turkio. – Bent Jensenius gvidis kelkajn interesajn vesperojn, en kiuj li donis eblecojn al aliuloj prezenti mallongajn temojn, kiuj ofte kreis viglajn diskutojn.

**Raporto de Århus Klubo**
*Raportas Stanislaw Mielczarek*

Nia klubo havas 26 membrojn. Ni daŭre kunvenas en Folkestedet, Carl Blochs Gade 28, 8000 Aarhus C.

Ni povas esti kontentaj pri la partoprenado en la kunvenoj.

En januaro la temo de la kunveno estis "Kia estos la nova jaro 2015?" kaj Stanisław Mielczarek daŭrigis serion de prelegetoj sub titolo "La 1-a Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer, Francujo en la jaro 1905".

En februaro okazis la Ĝenerala kunveno.

En aprilo Marie Holdt instruis nin desegni. La tasko ŝajnis facila, sed kiam Marie kuŝigis antaŭ ĉiu el ni ovon, montriĝis, ke nur kelkaj el ni desegnis ion, kio similis ovon.

La Somera ekskurso 2015 estis ekskurso al la muzeo Moesgaard en la suda parto de Aarhus. Tiu kulturhistoria muzeo translokiĝis en oktobro 2014 al tute novaj konstruaĵoj. Krom interesaj arkitekturo kaj eksponaĵoj ni povis admiri belegan naturon, kiu ĉirkaŭas la muzeon.

Post la muzea vizito ni ĝuis teon/kafon kun kuko en la havena restoracio "Navigator".

La temo de la septembra kunveno estis feriaj travivaĵoj. En oktobro kaj novembro Grethe Kvist, Erik Hjorth, Marie Holdt, Birgit Hytting kaj Paul Bigum rakontis pri ilia partopreno en la jubilea, 100-a Universala Esperanto-Kongreso en Lille, Francujo.

En decembro, laŭ la tradicio, ni solenis Zamenhof-tagon kaj Kristnaskon.

Henry Simonsen tradicie amuzis nin per Kristnasko-historieto.

Ni ĝuis varman vinon kun bulkoj, kafon/teon kun kuketoj, kiujn, kiel ĉiujare, prizorgis Agnete, Jørgen Kristoffersen kaj Henryka Mielczarek.

La estraro konsistas el: Stanisław Mielczarek – prezidanto, Grethe Kvist – kasistino, Tove Bak, Marie Holdt, Henry Simonsen kaj Erik Hjorth (anstataŭanto).

En la estraron de Fonduso de Betty Jensen ni elektis: Stanisław Mielczarek, Grethe Kvist, Tove Bak kaj Henry Simonsen (anstataŭanto).

Revizoroj: Jørgen Kristoffersen, Eckhard Bick kaj Tove Jyding (anstataŭanto).

**Raporto de la Nord-Jutlanda Klubo**

*Raportas Ejnar Hjorth*

En 2015 ni estis 20 membroj kaj 3 subtenantoj.

Dum la ekspozicio en Aalborghallen, ni disdonis pli ol 500 skzemplerojn de informiloj pri Esperanto kaj kun reklamo por Duolingo kaj kun telefono kaj adreso, kie oni povas lerni Esperanton en Aalborg. Do mi esperas, ke kelkaj reagos kaj kontaktos nin.

Mi ripetas, ke la plej grava afero por ni kaj por la kluboj estas informi pri Esperanto kaj oferti instruadon. Se ni ne faras tion, la kluboj mortos.

Nia klubaktiveco estas preskaŭ nur ekspozocioj kaj kursoj. La du komencanto-grupoj nun fariĝis unu, do nun ni havas 2 kursojn en du niveloj.

Nia jara kotizo estis sama kiel en la antaŭa jaro.

La membroj de la estraro estas:

Prezidanto: Ejnar Hjorth, Kasisto: Karen Jørgensen, Sekretario: Else Hjorth, Annette Holck

Revizoro: Karen Busck

# DEAs regnskab 2015

| *Indtægter* | *Kr.* | *Udgifter* | *Kr.* |
|---|---|---|---|
| Kontingent klubber | 9.675 | Administration | 8.589 |
| Individuaj | 7.950 | Gebyrer | 288 |
| DEJO | 400 | UEA & EEU konting. | 1.594 |
| Øvrige indt. | ./. 675 | Uddannelseskonto | 2.054 |
| Renter | 6.632 | Arrangementer | 9.254 |
| | | EeD | 8.369 |
| | | Libroservo | 3.787 |
| I alt indtægter | 23.982 | Udgifter | 33.935 |

**Årets resultat** ./. 9.953

| *Aktiver* | *Kr.* | *Passiver* | *Kr.* |
|---|---|---|---|
| Obligationer | 85.986 | Egenkapital primo | 156.210 |
| Libroservo | 48.746 | Årets resultat ./. | 9.953 |
| UEA konto | 708 | Egenkapital ultimo | 146.257 |
| Bankindestående DEA | 17.367 | Forudb.kontingent | 5.050 |
| Obligationer Noll | 57936 | Noll kapital ult. | 57.936 |
| | | Kreditorer | 1.500 |
| | 210. 743 | | 210.743 |

I. Schröder
**Ileana Schrøder**
**Formand**

**Arne Casper**
**Kasserer**

**Regnskabet er gennemgået og fundet i orden, den** 3/4-2016

Tara Gregers
**Tara Gregers**
**Revisor**

Sven Sandø
**Sven Sandø**
**Revisor**

# Protokolo de la jarkunveno de DEA

Dimanĉe la 17-an de Aprilo, je la horo 9.30 en Kragbjergaard, Odense.

1. Elekto de kunvena gvidanto. Elektiĝis Ana Røssum
2. Elekto de protokolanto. Elektiĝis Grethe Kvist
3. Jara raporto. Ileana Schrøder prezentis la jarraporton. Komentoj: Krom la en la jarraporto menciitaj forpasintaj membroj, forpasis ankaŭ Benny Nielsen. Rilate al problemo pri tro malmultaj membroj: Unuopuloj aktivas, interalie dum la Roskildefestivalo. Jens Larsen aldonis al la raporto pri gazetartikoloj artikolon pri interlingua-isto Thomas Breinstrup, kiu estis erare menciita kiel esperantisto. La jara raporto estis aprobita.
4. Jara kalkulaĵo. Arne Casper kaj Ileana prezentis la kalkulaĵon. La membro-gazeto estas granda elspezo, ĉefe la afranko multekostigas ĝin. La estraro tamen decidis daŭrigi eldonon de papera gazeto por servi ankaŭ al tiuj membroj, kiuj ne havas komputilon. La kalkulaĵo estis aprobita.
5. Laborplano de DEA 2016-2017. Ileana prezentis la laborplanon, kiu estis aprobita.
6. Propono: la estraro proponas aldonon al paragrafo 4: 4.1.5 subtenantoj (støttemedlemmer). La propono estis akceptita.
7. Elekto de prezidanto. (Ileana Schrøder ne akceptas reelekton kaj proponas Peter Wraa.) Peter estis elektita.
8. Elekto de estraranoj (Arne Casper kaj Bent Jensenius akceptas relekton. Ileana Schrøder deziras elektiĝi kiel estrarano.) Arne, Bent kaj Ileana estis (re)elektitaj.
9. Elekto de 2 anstataŭantoj (Ejnar Hjorth kaj Stanislaw Mielczarek akceptas reelekton). Ejnar kaj Stanislaw estis reelektitaj.
10. Elekto de 2 revizoroj kaj anstataŭanto (Tara Gregers kaj Sven Sandø akceptas relekton). Tara kaj Sven estis reelektitaj.
11. Jara Asembleo 2017. La plano estas jarkunveni en Svedio, kune kun Sveda Esperanto-Federacio. Dato kaj urbo ankoraŭ ne estas fiksitaj. La nova estraro plulaboros pri tiu plano.
12. Eventualaĵoj.

Peter Wraae dankis Ileanan por la granda laboro, kiun ŝi faris dum sia

prezidanteco de 2003 ĝis 2016. Aparte menciindas ŝia laboro pri la UK 2011 en Kopenhago.
Ileana substrekis, kiom gravas bona kunlaboro en estraro.
Estis demando pri jarkunveno de ILEI. Ĝi baldaŭ okazos.
Kio pri videbleco en gazetoj? Ne estis gazetara komuniko pri ĉi tiu jarkunveno. Peter Wraae planas verki kronikon por Politiken okaze de la 100-a datreveno de la forpaso de Zamenhof la 14-an de aprilo 2017.

# Programo de KEK

"Konversacia Esperanto-Klubo" kunvenas en la "Kulturdomo" Tomsgårdsvej 35, lunde je la 12.00 aŭ la 19.00 horo.

**La 9-an de majo je la 19-a**

Babila vespero. Venu babili pri ĉio kaj nenio.

**La 16-an de majo** *ne estas renkontiĝo pro la Pentekosto.*

**La 23-an de majo je la 19.00**

Filmo. Pli detala programo sekvos.

**La 30-an de majo je la 19-a**

Bent Jensenius gvidos la renkontiĝon. Plurpersonaj prelegetoj. Diversaj personoj prezentas diversajn temojn dum 10 ĝis 20 minutoj. Ĉiuj estas bonvenaj KUN aŭ sen temo. Komputilo kaj projekciilo estos disponeblaj.

**La 6-an de junio je la 12-a**

Betty Chattterjee gvidos la studgrupon. Ni daŭre legos la membiografion de Carl Nielsen. Ni legos la paĝojn 134 – 142.

**La 13-an de junio je la 19-a**

Babila vespero. Venu  babili pri ĉio kaj nenio.

**La 20-an de junio je la 19-a**

Ni parolos pri la venonta Universala Kongreso en Nitro.

# FLAM-analizo de la Dana Esperanto-Movado



*La tiel nomata FLAM-analizo estas metodo kiun la vicprezidanto de UEA, Stefan McGill, ofertas al la landaj asocioj kadre de la programo "Aktivula Maturigo" (AMO). Ĉi-jare la vico venis al Danio, kaj jene ni prezentas lian raporton:*




La 24-a Seminario pri AMO venis al produktiva fino en la 18a de aprilo en la dana urbo Odense. En EKO 12 ni jam raportis pri la FLAM-analizo, kiu opiniis pri la fortoj, lamaĵoj, avantaĝoj kaj minacoj de la dana kaj skandinavia movadoj. Sed analizo povas formi nur la komencan fazon de la ekzerco – el tio necesas tiri konkludojn. La sekvaj paĝoj de ĉi tiu komuniko liveras la solvoserĉajn ideojn el tiu AMO-ekzerco. Ni prezentas tion aparte por ke ĝi povu estonte iam (sed kiam…?) formi kolekton de la rezultoj de FLAM-analizoj faritaj en diversaj mondpartoj – ĝis nun okazis kvin.




## FLAM-ANALIZADO

FLAM-analizoj permesas pritakson de difinita organizo kaj situacio por trovi ĝiajn pozitivajn kaj negativajn aspektojn. Tion ni faras pere de kvar kategorioj:

- Fortoj: ene de la koncerna organizo
- Lamaĵoj: ene de la koncerna organizo
- Avantaĝoj: ene de la ĉirkaŭanta socio kie agas la organizo
- Minacoj: ene de la ĉirkaŭanta socio kie agas la organizo

Do, Fortoj kaj Lamaĵoj temas pri faktoroj, kiujn la esperantistoj povos mem regi aŭ influi. Kontraste Avantaĝoj kaj Minacoj temas pri faktoroj, kiujn la esperantistoj apenaŭ povas influi aŭ ŝanĝi, sed kiujn ili nepre devas atenti kaj kompreni, ĉar ili trudas sin el la ĉirkaŭaĵo en kiu la esperantistoj devas prezenti sin.

Analizado kompreneble konsistigas nur la komencan fazon – necesas el tiu analizo plue labori por proponi vojojn por solvoj. Ni faras tion laŭ la sekva skemo:

**E**voluigi la Fortojn
**K**uraci la Lamaĵojn
**E**kspluatu la Avantaĝojn
**K**ontraŭu la Minacojn

Laŭ la komencliteroj, la solvoserĉa ekzerco nomiĝas EKEK !

## ANALIZO pri la dana E-movado

FLAM
5

Temo de la nuna analizo:

La stato de la movado kaj la E-komunumoj en Danlando – kaj iugrade en Skandinavio

Eventoj:

Odense; la 24-a seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) kaj la 108-a Jarkunsido de DEA.

Dato, loko, gvidanto:

La 17-a kaj 18-a de aprilo, 2016 en Odense, Danlando; gvidis Stefan MacGill.

Partoprenantoj kaj daŭro:

20 seminarianoj kaj du kaj duona horoj.

# FORTOJ

- Bona volo, idealismo, aktivemo, longa movada historio.
- Tri urbaj kluboj kaj pliaj rondoj, okazigo de jarkunvenoj.
- Ekzistas kapablaj instruistoj, tradicio de lingvolernemo; granda reguleco de Eo.
- Fake kapablaj membroj ekzistas.
- Centre situanta lando, multaj vizitantoj, kunlaboro inter skandinaviaj movadoj.
- Relative bona financa stato, kun fonduso.
- Ekzisto de pluraj bibliotekoj, foje kun raraj libroj; libroservo.
- Uzado de skajpo kaj sociaj komunikiloj por internaciaj kontaktoj.

**FORTOJ – kiel Evoluigi ilin?**

- Ĉerpu el la bonvolo, por ke estraroj efike laboru kaj tiel inspiru membrojn al aktiviĝo.
- Lasu spacon por distro en la agadoj – trovu ĝuon en la uzado de la lingvo.
- Interesiĝu pli vaste pri la agado en aliaj urboj kaj landoj.
- Grupe diskutigu artikolojn el la revuo Esperanto, ekzemple el la serio ‘Dek demandoj’.
- Instigu al libro-legado, ekz. pere de la Sumoo-konkursoj.

# LAMAĴOJ

- Malfacilo altiri junulojn al la movado kaj specife al kluboj.
- Defio persvadi varbitajn junulojn voli organizi sin.
- La aĝostrukturo akcelas pasivecon.
- Interpersonaj kunpuŝiĝoj – historie malfacilaj.
- Teknikaj obstakloj skribi supersignojn.
- Malfacilo trovi kunvenejon pro granda biblioteko.
- Manko de instruistoj en difinitaj urboj; malfacileco reteni kursanojn.
- Dubo pri la rolo de tradiciaj kluboj; kvalito de programoj; tro da krokodilado.



**LAMAĴOJ – kiel Kuraci ilin?**

- Kreu novspecajn varbilojn – ankaŭ retajn - por diversaj celgrupoj.
- Organizu allogajn klubajn kunvenojn – sondu la dezirojn de la membroj.
- Konigi inter junuloj pri la ebloj ricevi subvenciojn, ekz. por vojaĝi kaj ĉeesti aranĝojn.
- Ofertu financajn avantaĝojn por junuloj.

## AVANTAĜOJ

- Libereco de esprimado kaj kunvenado.
- Tradicio de pacamo, asociiĝemo.
- Neceso lerni fremdajn lingvojn.
- Ebloj vojaĝi verde – moderpreza bonkvalita kulture riĉa turismo.
- Lingva parenceco de najbaraj landoj: DK, SE, NO, IS
- ·Subvenciebloj  de EU-instancoj.
- ·Rolo de la filozofio Martinus.



*Foto: Peter Wraae*

**AVANTAĜOJ – kiel Ekspluati ilin?**

- Okazos kunveno junie por adeptoj de Martinus – esperantistoj prezentu sin tie.
- Organizu busajn karavanojn tra apudaj landoj.
- Daŭre partoprenu en eventoj, kiel la rok-koncerto en Roskilde (plej granda en Eŭropo).

# MINACOJ

- Individuisma spirito akcelata pro la reto.
- ·Konkurenco de aliaj okupiĝoj – unuavice el la reto.
- ·Superrega rolo de la angla lingvo.
- ·Risko ofendi homojn de aliaj kulturoj.
- ·Manko de oficiala rekono, ekz. de la eduka mondo.
- Antaŭjuĝoj: Eo jam mortis, estas artefarita…
- La negativa influo de la lingvisto Jespersen.

**MINACOJ – kiel Kontraŭi ilin?**

- Celu homojn, kiuj devas aŭ volas lerni lingvon, kiu ne estas la angla.
- Ekspluatu la pozitivajn aspektojn de rete inspirita individuismemo.
- Formu aliancojn kun defendantoj de lokaj kaj minacataj lingvoj.

Komento: La analiza fazo kreis pli da punktoj ol la solvoserĉa; tio povas ŝuldiĝi al la pli granda tempo-dediĉo por la analiza ekzerco en la 17-a de aprilo ol por la solva parto en la 18-a de aprilo. Indas uzadi la analizon por pripensi pliajn strategiojn kaj solvojn. Indos, ekzemple en lokaj kluboj organizi FLAM-analizon kune kun EKEK pri la rolo kaj organizado de la klubo, kiel ĝi pli bone plenumu la dezirojn de la klubo-membroj, kaj kiel ĝi logu novulojn al la kluba rondo.

**FLAM-ANALIZOJ**

| | | |
|---|---|---|
| FLAM 1: | Junio 2014 | Pri la movado en Bulgario (farita ekster la kadro de AMO). |
| FLAM 2: | Aŭgusto 2014: | Pri la movado en Italio kaj en Eŭropo (kadre de AMO 5) |
| FLAM 3: | Oktobro 2015 | Pri la funkciado de Kulturcentro Greziljono (kadre de AMO 15) |
| FLAM 4: | Decembro 2015 | Pri la movado en Sudorienta Eŭropo (kadre de AMO 17) |
| FLAM 5: | Aprilo 2016 | Pri la movado en Danlando kaj Skandinavio (kadre de AMO 24) |




*Ni semas kaj semas – supre nia nova prezidanto Peter Wraae kun Lise-Lotte Thorup kaj Ina Schultz en la foiro "Krop-Sind-Ånd" en Odense, sube Sirwa Leila kaj Karen Jørgensen en la samnoma foiro en Aalborg.*

